Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 2-a de Majo 2022

Ĉeestantoj: fizike – Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Avigail Meŝulam, Inbar Mor, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel; zome – Mikaelo Lineckij, Eran Juval-Vodevoz (el Aŭstralio), Gabi Zeevi. **Gastoj:** fizike – Amos Ŝapira, zome (parte)**:** Jinon Meiri. **Eksterlandaj**: Zofia Kogalska, Andreo Pacholski.

La Estraro esprimas siajn bondezirojn kaj varmajn gratulojn al Gila kaj Amri Wandel, pro la naskiĝo de la geĝemeloj de ilia filino, Maja.

***Protokolo** de la pasinta (aprila) kunsido estis sendita al la estraranoj kaj enretigita.*

1. Raportoj

a) Renovigo de la lu-kontrakto pri nia poŝtkesto por tri jaroj: **Amos Ŝapira** traktis la aferon, paginte 600 NIS (laŭ la antaŭa prezo). ***Dankon!***

b) Dum la memortago pri la Holokaŭsto en "Yad-Vashem" **Chaja Peer** kaj **Laurin Lewis** reprezentis nian Asocion, la israelajn esperantistojn. ***Dankon al ili!*** **Amri**: ĉirkaŭ 300 homoj malfermis la fotojn kaj la raporton pri la evento en "Yad-Vashem" senditaj per la E- retlistoj (de ELI kaj de UEA).

2. La 22-a Israela Kongreso en Jafo kaj la Postkongresa Ekskurso (Amri)

a) Ekestis deficito pro la subvencio de la kotizoj por eksterlandanoj. Pro la fakto, ke la hotelo ***Mishkenot Ruth Daniel*** misprezentis la prezojn, Amri devis negoci pri kompromisa prezo, inkluzive cedon je vespermanĝoj. La israelaj loĝantoj en la hotelo devis pagi iom pli, sed ne la eksterlandanoj, ĉar tiuj dekomence pagis iom pli altan kotizon por kovri eventualajn kurzoŝanĝojn.

b) La PK kaŭzis eĉ pli grandan deficiton (proksimume 450 eŭrojn po partoprenanto). La buĝeto estis farita laŭ 10 personoj, ĉar en 2020 aliĝis 20, sed efektive en Jordanio estis nur 6. ELI devos subvencii proksimume per 10 mil NIS. La grandaj elspezoj kiuj dividiĝus inter la partoprenantoj: luo de aŭtomobilo en Israelo (1,800 NIS), minibuso en Jordanio (350 USD), elspezoj de la ĉiĉerono. La programo pri du tranoktoj en Jordanio devis esti modifita, ĉar vendrede kaj sabate la limo estas fermita (restaĵo el la koronpandemio). Pro tio la partoprenantoj restis nur unu nokton, kaj sekve devis pagis 60 USD por la jordania vizo.

c) Amri devis pri ĉio zorgi mem, ĉar Nava demisiis pro personaj familiaj kaŭzoj. Estis tre multaj problemoj, korespondado kun la hotelo, kun ĉiuj aliĝintoj – li investis dekojn da horoj! **Amri**: estonte ni devas zorgi pri helpanto! Krome, la kotizoj dependu de la nombro de la partoprenantoj, ekzemple: 10 kaj pli – 700 eŭroj, 6-10 – 1,000 eŭroj, 3-5 – 1500 eŭroj. **Eran**: neniu aliĝos sen scii la prezon. **Jehoŝua**: estonte ni devos publikigi proksimuman prezon inter du limoj, sed nun – ni devos kovri la deficiton. **Amri**: okazigante la PK-on kaj ne nuligante ĝin malgraŭ la rezigno de multaj el la aliĝintoj de 2020, ni protektis la reputacion de la Israela Kongreso kaj PK por eksterlandanoj kaj konservis la tradicion! Tre favoraj raportoj aperis pri

2/...

ĝi en la E-medio (aparte dupaĝa artikolo far Georgo Handzlik en la maja n-ro de ***Revuo Esperanto***).
Decido: *ELI kovros la deficiton de la PK (unuanime).*

3. Libroj de Rami Ŝlain (Jehoŝua)
Jehoŝua: temas pri ĉ. 15 libroj, kiujn Rami deziras transdoni al ELI. Ĉar li loĝas en Givatajim (kiel Eran) lia telefonnumero estis transdonita al Eran, por plua traktado.

4. Raporto de la Kontrol-Komisiono pri 2021 (Ŝlomo)
Ŝlomo: la Ĝenerala Kunveno devos aprobi la Raporton; pro ties longeco ĝi estos traktota en la junia kunsido.

5. Landa Kunveno (Jehoŝua)
Jehoŝua: mi proponas ĝin por la 20-a aŭ 13-a de Junio en ***Bejt-WIZO***. **Unuanime akceptita**. Jehoŝua parolos kun la direktorino.

6. Libro-magazeno por ELI (Ŝlomo)
Ŝlomo: ĝi ne devas esti en la Tel-Aviva regiono, do eblas trovi malpli kostan – sed nepre facile alireblan kaj per publika transporto kaj per privata aŭto (por liverado de la libroj); nia buĝeto estas ĉ. 150 mil NIS. **Amri**: Eran devus havi hejme kartonan keston kun la libroj de Ludovikito. **Eran**: mi serĉos.

7. Dratwerejo (Ŝlomo, Jehoŝua)
a) La ŝuldo pro la gaso – laŭ nia advokato la kompanio ne rajtas malkonekti la gason; sekve la servoj devos esti transigitaj al la nomo de la luantoj.
b) Ni pagu la bitumenigon de la tegmento (nia parto: 900 NIS). La nova dom-komitatano plurfoje kontaktis pri tio kun Amri, kiu direktis ŝin al Ŝlomo, kaj la prizorganto de la loĝejo siavice diris, ke li pagos kaj deduktos de la venonta lupago al ELI.

8. *Israela Esperantisto*
Mikaelo: la venonta numero estas preskaŭ plena, antaŭ la provlego; ĝi estu preta por la LK.

La venonta kunsido: lunde, la 6-an de Junio 2022, je 20h00 (en Alon-Turo-2, hibride). (*Amri estos eksterlande en la Germana Kongreso, provos kontakti zome).*

Protokolis: ***Gabi Zeevi****, kun aldonoj de* ***Amri Wandel***